N° 1

Februaro 1913

MONATA ALDONO
al FERVOJA ESPERANTISTO (N° 7)

Jara abono 1 Sp.
Redaktio : S-roj Berlande kaj George Chilot
Villeneuve St Georges (Francujo)
Sekretario : S-ro Alfred Petzold, Konigstr.
4 III Leipzig (Germanujo).

---

AL MIAJ KARAJ LEGONTOJ

Malfortika kaj modesta mi aspektas; tion mi mem pensas pri mi. Tamen mi ne estas hontema alveni antaŭ Vin duone senvestita, tio estas kvor-anstataŭ okpaĝe, kiel antaŭe dum miaj infanaj monatoj.

Tromemfideco kaj ankaŭ malavareco malsanigis min periode kaj devigis min sammaniere enhejmiĝi ĝis nova pliboniĝo de mia stato. Nuntempe, miaj fortoj reaperas kaj mi estas certa vivi unumonate ĝis la fino de la jaro, dank'al la sindono de la fervoraj esperantistoj kies nomoj estas sube.

NOMARO DE LA JAM ABONINTOJ

Johano Perriard, Oficisto SFF - Direction Générale des CFF, Berne, (Svislando).
Hans Nusslein, Hohlweg I, Regensburg (Germanlando).
F. Kacker, Obergutervorsteher, Haûptbahnhof, Chemnitz (Saksujo).
Eduard Szŷmanowski, Vic. Prezidanto Nia, Werderstr., 23 I, Bromberg.
George Chilot, Villeneuve St Georges, Francujo)
Armand Berland, - same -
Hinrichsen, Strandparkvej 34, Hellerupt - Kopenhague (Danujo).
Roche, Oficisto P.L.M., 70, rue du Rendez-Vous, Parizo.
Mathiak, Kurt, Fervoja Supernumeraro, Altstadtischer Graben 50, II, Dantzig, (Germanujo).

Gabriel Lamy, rue de l'Eglise, Chaulnes de Picardie (Somme) Francujo.
Suinot, Gare de Canaples (Somme) Francujo).
Josef Blaẑek, Ferv. revidento, Olomûc 4, H. Frohl, 25, (Moravio en Aûstrio).
Aussenac, Lokomotivejestro, St Dizier, Haute-Marne, (Francujo).
Tarnow, Prezidanto de la I.A.E.F. Nia, Windscheidstr., 11 I, Charlottenburĝ, (Germanlando).
Henriko Rusterholz, Fervoja Termezuristo, Leimenstr., 2, Bâle (Svislando).
Honoratus Bonnevie, Bergsliensgate, 11, Kristiana, (Norveglando).
J: Bal, Nassaû Singel, 18, Breda (Hollando).
C. Bendel, Zwickaûerstr., 85 I, Dresden, (Saksujo).
Walther Prems, Staciestro en Leisnig (Saksujo).
Bomtemps, 4, Villa Les Cerises, à Colombes (Seine) Francujo.
Albert Huguet, Segisto ĉe Stata fervoja metiejo, 25, rue Bourie Rouge, Orléans, (Francujo).
John Lundgren, Hedemora, Svedujo.
Propaganda Ligo Parkurbo-Esperanto, Munchen. (du abonojn).
Georg Davidow, Boite postale N° 12, Saratov, (Rusujo).
Eugen Ehnis, delegito de U.E.A. por Hoboken, N.J., 105, Havothorne St Flatbush, Brooklyn, N.Y., Usono.
Paûlo Meden, Kovna (Rusujo) - du abonojn).
Joh Engst, fervoja asistanto, 18, Klopstockstr. Dresden-Cotta (Saksujo).
Alfred Petzold, fervoja asistanto, 4 III, Konigstr., Leipzig (Germanujo).
W. F. Lawrence, 29, Moorgate, York (Anglujo).
H. Grillet, substaciestro, 17, rue Gaillot Aubert, Ste Menehould (Marne) Francujo.

Ju pli ni havos abonintojn, des pli ni

riĉigos nian enhavon kaj nian amplekson. Devige estu ke ĉiu el ni varbu almenaŭ unu kolegon. .§.

LA FORRAMPADO DE LA RELOJ.

Ciu fervojisto verŝajne scias, ke la kompensaj spacoj inter la rel-kunligoj fermiĝas per varmeco sed ankaŭ per alia kaŭzo konata kiel FORRAMPADO DE LA RELOJ. Tiu rampado okazas ĉe duoble-vojaj linioj en la direkto de la vagonaroj kaj ĉe unu-vojaj linioj laŭ direkto in kiu veturas la pli pezaj vagonaroj, kaj estas kaŭzata precipe per la bato de la radoj kiam ili transiras de uňu relo sur alia. Gis nun ne ekzistas perfekta kontraŭ-rimedo. Somere la genaĵô kaûzas multan laboron al la vojestroj pro la retro-ŝovado de la reloj. Do elpensantoj serĉu !

Forrampado de la reloj = (Germ.) Wandern der Schienen = (Hollande) krinpen der sporen. K. T. P.

J. Bal el Breda (Hollando).

.§.

"LA ONDO DE ESPERANTO"
Monata ilustrata revuo
(fondita en la jaro 1909).

La abonantoj de la j. 1912 jam ricevis senpage romanon de A. Tolstoj "Princo Serebrjanij" : kies prezo por ne-abonintoj estas Sm. 1,60 afr. Nun ĉiu abonanto de la j. 1913.- krom 12 n-roj de l'gazeto, - senpage ricevos donace belan

Esper libron:
"ORIENTA ALMANAKO"

el la lingvoj japano,ĥina, araba, hinda, sanskrita, persa, armena, kartvela, k.t.p. "La Ondo" aperas akurate la 1 - an daton, novstile. Ciu n-ro havas 16 - 24 paĝ. Formato 17 - 26. Bela kovrilo.
Literaturaj, konkursoj kun premioj. Portretoj de konataj Esperantistoj. Diversaj ilustraĵoj. Beletristiko originala kaj

tradukita. Plena kroniko. Bibliografio. Amuza fako (kun premioj). Anekdotaro. Korespondo tutmonda. (Poŝtk. ilustr.).
ANONCO EN "KORES. FAKO" - 3 RESPONKUPONOJ
La abonpagon (2 rubl. = 2,120 sm). oni sendu al librejo " Esperanto" (Moskvo, Tverskaja, 26, Ruslando) aŭ al aliaj. Esper. librejoj - poŝtmandate, respondkupone, papermone, per bankĉekoj aŭ per transpag. de Esp. ĉekbanko.

.§.

ALVOKO.

La Redaktio turnas sin al ĉiuj abonintoj kaj petas insiste por ke ili aĉetu almenaŭ unu lotleteron ĉe "Propaganda Ligo Parkurbo Esperanto", en Munchen.

Unu el Nia Estrarano aĉetis unu bileton por la I.A.E.F. kaj tiu bileto estas gajninta 3 M. 25. La Sekretario de la P. L. P. Esperanto, sendis al Nia Kasisto, kun tiu sumo, du Spesmilojn por du abonoj al Nia gazeto. Dan kojn ni ŝuldas al Parkurbo Esperanto; kiu estas daŭrigonta propagandon por I.A.E.F.

Do, estas nepre necese ke ĉiuj fervojistoj ne marĉandu kiam temas por revivigi Nian Asocion kaj pligrandigi Nian fakon gazeton.

.:.

Fraŭlino Marie-Louise Chilot, 54, rue de Paris, Vve St Georges, dekdujara kies oreloj aŭdas konstante zumadi ke Esperanto estas facillerneblan lingvon, lernos ĝin, se oni sukcesos konvinki ŝin. Sendu per beloj bildpoŝtkartoj argumentojn.

;§:

Kun kopirinko, skribu al s-ro Chilot.

-----------

Le Gérant : A. Berlande.

--------------------------------------